Eŭropa Esperanto-Unio, Avenue Louise 405, bte 9, BE-1050 Bruselo, Belgio www.europo.eu

Kongresaj konkludoj akceptitataj de ĉiuj kongresanoj kun unu sindetena voĉo:

La 9-a Kongreso de EEU en Galivo, Irlando, kun 157 partoprenantoj el 28 landoj, okazinta de la 16-a ĝis la 20-a de Julio 2012, kies temo estis "Lingvolernado en EU: lerni pli, kosti malpli":

1. rekomendas ke la irlanda prezidanteco de la Konsilio de EU 2013 aldonu "multlingvismon" al siaj prioritatoj,
2. proponas ke la EU-Konferenco pri multlingvismo en Kipro de la 26-a ĝis la 29-a de septembro 2012 rekomendu ke ĉiuj EU-membroŝtatoj donu seriozan konsideron al la rekomendoj de la Civilsocia Platformo por Multlingvismo, 2011.
3. aldone proponas ke la kipra konferenco diskutu kiel praktike progresigi la unuan rekomendon de la Civilsocia Platformo en la sekcio pri edukado, nome, la dezirindecon de pilotprogramoj en la bazlernejoj de pluraj EU-membroŝtatoj por ekscii kiu 2-a lernata lingvo plej multe kuraĝigas la lernadon de 3-a lingvo, cele al plenumo de la oficiala lingvopolitiko de EU, decidita fare de la Eŭropa Konsilio en Barcelona en 2002, kaj subtenata de 72% de EU-civitanoj laŭ Eurobarometro 2011, ke ĉiu EU-civitano lernu 3 lingvojn, la denaskan kaj 2 aliajn,
4. konsideras ke la brita programo "Springboard to Languages" (www.springboard2languages.org) povus plibonigi kaj plirapidigi la lernadon de la irlanda lingvo kaj la lingvolernadon ĝenerale, kaj do rekomendas al la irlandaj lernejaj instancoj fari pilotprogramon baze de "Springboard to Languages" por testi ĉu tiu aliro estas efika en irlandaj cirkonstancoj.